

Vasta solidareca programo al Kubo okazos en Hispanio



Madrido, jun 10 (RHK) Multaj solidaraj agadoj kun Kubo okazos en Hispanio ekde la venonta 19-a de junio, postulante la finon de la usona blokado.

Membroj de solidarecaj movadoj kun la kariba insulo kaj kubanoj loĝantaj en Eŭropo fermos kampanjon por kolekti monon por la aĉeto de injektiloj.

La iniciato planas sendi al Kubo tri milionojn da injektiloj, por kiuj la ĉefata Movado de Solidareco kun Kubo (MESK) jam tre proksimas al la celo.

Sodepaz (Solidareco por Disvolviĝo kaj Paco), la ĉefa iniciatinto de la ideo, diris, ke pli ol 215 mil eŭroj estis kolektitaj en Hispanio, kio garantias la akiron de pli ol du milionoj kaj duono da injektiloj por la vakcinado kontraŭ Covid-19.

La MESK certas, ke la 23-an de junio la cifero de tri milionoj da ĉi tiuj sanitaraj aparatoj estos atingita kaj eŝ superita en kampanjo nomata "Blokadoj mortigas, via solidareco savas vivojn".

Laŭ fontoj, sabate la 19-an ĉi-monate, virtuala kunveno de kubaj loĝantoj en Eŭropo okazos en Parizo, Francio, kiu ratifos la eventojn planitajn por la 20a, 22a kaj 23a de junio en Hispanio.

La MESC kaj la Federacio de Asocioj de Kubaj Loĝantoj en Hispanio (Facre) planas plurajn agadojn tra la tuta Iberia lando, kun Karavano Kontraŭ la Blokada en Vallecas, Madrido la 20an.

Same, similaj kunvenoj okazos en Tudela, Navarra, Eŭskio, Andaluzio, Kanariaj Insuloj, Katalunio kaj Galegio, inter aliaj, kun proksima en la centra Puerta del Sol de Ĥi tiu Ĥefurbo.

fonto: PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/260259-vasta-solidareca-programo-al-kubo-okazos-en-hispanio>



Radio Habana Cuba